

Gerda Illerhues,
 Vespera krepusko
tradukita de Manfred Retzlaff

Vespera krepusko –
 Sinkas la sun’.
 Ombrojn ludantajn
 vidas mi nun.

Vespera krepusko –
 Susuras la vent’,
 fora ekrido
 en la silent’.

Vespera krepusko –
 Aŭdiĝis jen kri’,
 turmenta hastado,
 jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –
 Eklumas la klar’,³
 dum noktoproksimo,
 de la stelar’.

...

Gerda Illerhues,
 Abenddämmern

Argiope-informo:
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

³ aŭ:
 Eklumas en klar’,
 dum nokt’ proksimiĝas,
 jen la stelar’.

Vespera krepusko –
 Tempo de l' ben',
 estonto tre foras
 kaj la maten'.

Vespera krepusko –
 ripoz' ĉie ĉi,⁴
 paca trankvilo
 elmane de Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abenddämmern" de GERDA ILLERHUES (*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2001-05-29.*

MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas GERDA ILLERHUES (*1930).*

Arg-771-1545 (2013-01-16 18:15:06)

Tiu ĉi poemo aperis en la jaro 2001 en la gazeto "Landwirtschaftliches Wochenblatt für Westfalen-Lippe". La verkinto, s-ino Gerda Illerhues, loĝis en Lehmburgstr. 50, D-46282 Dorsten, Germanio.

⁴aŭ senrime:
 ripozas la land',
 paca trankvilo
 el Dia man'.